

BAES

Brazila Asocio de Esperantistaj Spiritistoj

Gazeto de BAES

Aperas 1-foje jare

2-a jaro | n-ro 2 | Julio 2022



**TUTNOVA
ESPLORO**

ESPERANTO KAJ SPIRITISMO

Frua Periodo kaj Pioniroj



SEN PAGA
elektronika eldono.
Presitaj ekzempleroj
haveblas laŭmende.



ALKLAKU
por kontakti
la redakcion.

Laŭvica
n-ro aperos
en septembro 2023

Gazeto de BAES | 2-a jaro | n-ro 2 | Julio 2022 | Korektita versio 1.1
Organo de *Brazila Asocio de Esperantistaj Spiritistoj*, fondita en 2008
QR 517 Conjunto M, casa 12, Santa Maria, Braziljo-DF
Tel.: +55 34 997748785 | kontakto@baes.org.br | www.baes.org.br

Ĉefredaktis Cecílio Tomé | **Kunredaktis** Paulo Cesar Pires
Enpaĝigis Leandro Abrahão

Kunlaboris Fábio Fortes, Jader Rodrigues da Silva, Harison de Alencar,
Leandro Abrahão, Joel do Ó, Josenilton Nascimento, Paulo Sergio Viana,
Maria Betania de Oliveira, Luís Sérgio Morais kaj Gustavo Magalhães.
Provlegis José Roberto Alves, Harison de Alencar kaj Odília Milhomens.

Pri la subskribitaj artikoloj respondas la aŭtoroj mem.

Speciala danko al *Biblioteko Carlos Domingues*, Brazilo, al *Esperanto-
muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj*, Aŭstrio, al *bitarkivo.org* kaj al *Brazi-
la Spiritisma Federacio* pro la elektronika disponigo de ĉiuj numeroj de
Reformador, ties oficiala organo.

Bildoj kaj Fotoj: [Encyclopédie Spirite](#), [Wikipedio](#), [cak.org.br](#),
[Reformador](#), propra arkivo.

ESTRARO DE BAES (Mandato 2021-2024)

Prezidanto: Leandro Tomé Abrahão
Vicprezidanto: Sandro Moreira Alves
1-a Sekretario: Paulo Cesar Pires
2-a Sekretario: Harison Gomes de Alencar
Kasisto: Rodrigo de Carvalho Mendonça



KOVRILO: Adreso de J. C. Chaigneau (Parizo, Francio), pri kiu vi povos legi en la ĉefartikolo de nia revuo. [Kuriozaĵon pri ĝi legu sur paĝo 32.](#)

ENHAVO

[p. 04 | Malferme – Klarige](#)

[p. 05 | Aperas Legantaro – Leterkeste](#)

[p. 07 | Pli Riĉa Kleriĝejo – Klerige](#)

[p. 08 | Kampanjo Abel Gomes – Lanĉe](#)

[p. 13 | Ĉeesta BRES, Finfine! – Renkonte](#)

[p. 16 | Presita Suplemento al la Gazeto de BAES – Eldone](#)

[p. 18 | Esperanto kaj Spiritismo – Frua Periodo kaj Pioniroj – Explore](#)

[p. 34 | La Psikaj Faktoj – Felietone](#)

[p. 39 | Vizio de Eurípedes – Rakonte](#)

[p. 43 | La Libro de la Spiritoj – 165 jaroj – Solene kaj Rakonte](#)

[p. 47 | Evangeliaj Plukoj – Edife](#)



La artikoloj *Kampanjo Abel Gomes* (p. 8), *Esperanto kaj Spiritismo – Frua Periodo kaj Pioniroj* (p. 18) kaj *Psikaj Faktoj* (p. 34) enhavas plurajn piednotojn, kiujn vi trovos ne sur la respektivaj paĝoj, sed fine de la respektivaj artikoloj.

MALFERME

En majo 2021 lanĉiĝis nia Gazeto. Unu el la aliĝkategorioj de la 11a Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj (BRES), okazinta en aŭgusto de la pasinta jaro inkluzivis ricevon de unu presita ekzemplero de ĝi. Tiam ni disponis precize pri tridek presitaj gazetoj. Post nelonga tempo ĉiuj numeroj estis menditaj. Kia ĝojo! Fábio Fortes estas la unua mendinto.

Ni aldonis al la ekspeditaj kovertoj malgrandan salutpapecon kun la informo, ke tiam la dua numero estis jam redaktata, kaj aperus en septembro. Jes, ĝi estis redaktata, sed efektive ne aperis en septembro, kiel ni planis. Kvankam ni laboris kons-

tante, tamen baldaŭ ni konstatis, ke necesus pli ol kvar monatoj por finpretigi ĝin. Ni skrupule informis nian komunumon, ke temis ne pri *fiasko*, sed pri *prokrasto*.

Nun finfine vi tenas en la manoj la duan numeron de nia organo. Ĝi aperos ĉiam unufoje jare, ne dufoje, kiel ni esperis. Estas pli saĝe eldoni unu zorge redaktitan numeron ol du sub nepravigebla tempopremo.

Ni partodonas en la sekva paĝo kelkajn opiniojn de la legantaro, kiu ekestis kun nia revuo.

Havu bonegan legadon! Tion deziras la redaktoskipo kaj la estraro de BAES.

APERAS LEGANTARO

Post la lanĉo de nia Gazeto, opinioj de diversaj legantoj komencis alveni el pluraj fontoj. Ni nun publikigas kelkajn el ili.

"Tel hazarde la ĵus debutinta Gazeto de BAES atingis min. Pro scivolo, mi ekfoliumis ĝin kaj, ne sen granda surprizo, mi pleniĝis de gapo kaj ĝojo (...). Esperante, ke ĉi iniciato prosperu, floru kaj fruktu, mi gratulas, do, al ĉiuj, kiuj kontribuis por ĝi! Estime kaj danke, **Ĵader.**"

"Al mi ege plaĉis la unua numero de la Gazeto de BAES, forme kaj enhave." (**Affonso Soares**)

"Dankon, tre bela eldono!" (**James Piton**)

"Mi ĝojegis scii pri la revuo!" (**Luís Sérgio**)

"Kia bela surprizo! La Gazeto estas bela, riĉenhava, eleganta (...). Kaj ĝi plenigas truon en nia movado!" (**Paulo Sergio Viana**)

"Kia bela Gazeto! Bele prezentata kaj serioze verkita (...). Ricevu mian apogon kaj brakumon!" (**Pedro J. Cavalheiro**)

"Nia 'Servo de Esperanto de CEERJ' gratulegas vin pro tia allo-

ga kaj pensiga periodaĵo, Evangelie, Spiritisme kaj Esperantlingve (...). IRU ANTAŬEN." (**Givanildo**)

Mirinda, leginda, legenda Gazeto! Prosperon! (**Adelson Sobrinho, fejsbuke**)

"Tiaj interesaj esploroj iom embarasas nin nuntempulojn, ĉar ili montras kiel aŭdacaj, kreamaj kaj praktikaj estis niaj pioniroj... Unu afero tamen nin konsolas: tiam ili ne havis bele fasonitan gazeton! Gratule, **Jose R. Tenorio.**"

"Ni deziras ankoraŭ elkore danki vin por la alsendo kaj gratuli al vi pro tiu bela, impresa iniciato al kiu ni deziras longan vivon kaj sukcesan disvolviĝon. Kun amikaj salutoj, **Bernhard Westhoff**, sekretario de Bahaa Esperanto-Ligo."

Kontaktu nin!

kontakto@baes.org.br






Liveritaj revuoj. Fotoj senditaj de la ricevintoj.



Rodrigo de Carvalho
Mendonça



Paulo Sergio
Viana


Ĉu vi havas fotojn ligitajn kun via Esperanto-spiritista agado?
Bonvolu sendi al kontakto@baes.org.br! Ni ĝojos ricevi ilin!

PLI RIĈA KLERIĜEJO

Ekde la lanĉo de ĉi tiu abonservo, en 2021, multe da novaj materialoj aldoniĝis al la Kleriĝejo de BAES. Temas pri retejo, kiu enhavas plurspecajn materialojn interalie por Esperanto-spiritistaj aktivuloj.

En la retejo vi trovos videojn, sondokumentojn, jarlibron (por membroj), numerojn de nia Gazeto, kurierojn, historiajn dokumentojn kaj dekojn da kompilitaj materialoj pri tradukarto. Escepte de la videoj, ĉio estas senpage alirebla.

Skanu la QR-bildon per via apotelefono kaj senpage kreu konton. Vi povas aliri la retejon rekte per iu retumilo, aŭ per la apo *Hotmart Sparkle*. Aboni la servon (jara kotizo de R\$60 realoj) vi povos en la retejo mem, post ensaluto.



Kampanj o ABEL GOMES

Por Esperanto-spiritismaj libroj en la bibliotekojn de Spiritismaj Societoj



Abel Gomes (1877-1934)

Dum la 12a Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj (BRES), BAES lanĉis la Kampanjon Abel Gomes (KAG) omaĝe al la onklo de Ismael Gomes Braga (1891-1969), pioniro de la Esperanto-spiritisma movado en Brazilo. La Kampanjo celas senpage provizi ĉefe bibliotekojn de spiritistaj societoj per spiritismaj libroj en Esperanto kaj per lernolibroj de la Internacia Lingvo (almenaŭ po unu litera-

turaĵo kaj unu lernilo). Depende de la stoko de la Asocio, librojn povos ricevi ankaŭ individuoj.

Antaŭ la oficiala lanĉo mem, dum la jara evento de BAES, okazis la unuaj ekspedoj: al societo en Brazilo kaj kelkaj unuopuloj, el kiuj unu loĝas en Portugalio. La stoko de la Kampanjo, krom la libroj senditaj antaŭ ties diskoniĝo, konsistas el pluraj titoloj en la kvanto de pli ol 300 ekzempleroj, malavare do-

nacitaj de estraranoj de BAES, de s-ino Maria das Dores Goes kaj de Asocio Spiritisma Mondo. Menciindas ankaŭ la kvanto, kiu devenas el la kolekto de la forpasisinta Esperanto-spiritisto Luiz Antônio P. de Oliveira Júnior (1962-2016), el Uberlândia, kaj el la kolekto de lia samurbano d-ro Carlos de Almeida Wutke (1915-1987), kiun posedis Luiz Antônio mem. Multaj verkoj bezonis purigon kaj riparon. Bonŝance post la necesaj disponoj preskaŭ ĉiuj libroj estas denove bonstataj.

Surbaze de skiza biografio el la retejo de Brazila Spiritisma Federacio¹ kaj de du numeroj de ties oficiala organo *Reformador*², ni prezentas iujn informojn pri la patrono de la ĵus lanĉita Kampanjo.

Abel Gomes naskiĝis la 30an de decembro 1877 en la urbeto Conceição do Turvo (nuntempe Senador Firmino), ŝtato Minas Gerais, Brazilo. Li forpasis en la aĝo de 56 jaroj la 16an de aŭgusto 1934. Ne lernis longe ĉe lernejo, sed fariĝis memstare klera persono. Ofte artikolis por lokaj periodaĵoj kaj postlasis multajn poemojn. Estis muzikisto kaj komponisto. Laboris kiel instruisto ĉe du mezgradaj ler-

nejoj ĝis li fariĝis paralizulo. Ek-konis spiritismon kaj pleniĝis je vivoĝojo. Lernis la tajloran kaj fotografian metiojn. Tro modesta, ne aŭdacis publikigi siajn spiritismajn verkaĵojn, escepte de kelkaj pro insisto de la nevo Ismael. Plurfoje Abel promesis posteume heredigi al li siajn manuskriptojn – kion li verŝajne plenumis, ĉar post lia morto pluraj liaj verkaĵoj aperis en *Reformador*. Ne edziĝis, nek havis gefilojn. Vivis kune kun pli aĝa fratino, kiun li vivtenis. Dum la tuta vivo estis ĉirkaŭata de personoj, kiujn li helpis plurmaniere, eĉ kiam li estis malsana kaj en granda bezono.

Mallonga reklamo de lia libro *A Felicidade* (La Feliĉo), en *Reformador* de oktobro 1940, jene priskribas lin:

Abel Gomes, prozisto kaj bonega poeto, fervora adepto de spiritismo kaj de Esperanto, estas la aŭtoro de tiu verketo, dividita je partoj proza kaj versa (...).

Sekvas eltiraĵo el la antaŭparolo verkita de lia nevo Ismael:

Paralizita, malriĉa, preskaŭ blinda, vivtenanta sin per la ĉiutaga laboro kiel tajloro, Abel Gomes devus esti malfeliĉa kaj se-



Maldekstre: Frontpaĝo de donacita libro, kun inko- kaj glustampoj de BAES.
Dekstre: En poŝtofiĉejo, la unua ekspedo.



Maldekstre: Sidejo de la spiritisma societo “Lar de Maria – Associação Assistencial Espírita”, en la urbo Belém-PA (la unua societo, kiu ricevis librojn el la Kampanjo). Ni elkore dankas al s-rino Odília Milhomens pro la helpo je la redakto de la regularo de la Kampanjo. Ŝi respondas pri la Esperanta fako de Paraa Spiritisma Unuiĝo.
Dekstre: La komenca stoko de la Kampanjo.

nutila, sed li estis tamen la plej feliĉa kaj utila homo, kiun mi iam ekkonis kaj al kiu mi streĉe rilatadis dum pli ol tridek jaroj.”

Krom la portugalan, Abel regis la francan kaj Esperanton. La lingvon de d-ro Zamenhof li lernis per koresponda kurso. Tion rakontas Ismael en sia libro *Veterano?*³:

En 1912 mi malfermis kurson. Nur du junuloj ellernis la lingvon. Ni tri fondis la klubon “Junularo”, kies ĉefa celo estis instrui la lingvon per korespondado en aliaj lokoj, ĉar en nia vilaĝeto [Teixeiras-MG] neniu alia ĝin volis. Ni presigis kaj dissendis cirkuleron al ĉiuj varbeblaj homoj, en espero, ke ni baldaŭ esperantistigos la tutan landon. Nia instruado estus tute senpaga, kaj kiu rifuzos lerni tute senpage gravan mondlingvon? Sed preskaŭ neniu respondis. Certe, nia propagando estis tre mallerta! Nur unu lerninto per korespondado finis la kurson: – S-ro Abel Gomes, mortinta antaŭ tri jaroj⁴ – kiu bonege ellernis la lingvon, sed neniam ĝin uzis, escepte en korespondado kun mi.

Laŭ Ismael, la onklo promesis, ke post la morto li trovos rimedojn por daŭrigi la kores-

pondadon kaj kunlaboradon. Pli ol dek jaroj pasis ĝis la konkretiĝo de la promeso. La 29an de marto 1945 Chico Xavier mediume skribis mesaĝon⁵ de Abel al lia nevo. En la sufiĉe longa letero, Abel malkaŝas i.a. kiel malfacile estis al li finfine ion komuniki, kiel li ĝojis resaniĝi kaj esti kapabla denove paŝi. Li diras plu: “Ne pasis multe da tempo, kaj la Sinjoro permesis al mi realproksimiĝi al via laborado.” Piednote Ismael asertas, ke tiun novan kunlaboron li intuciis pro la konsiderinda kresko de lia laborpovo kaj, pli malfrue, pro la eldono, ene de malmultaj jaroj, de pluraj verkoj, pri kiuj li ne pensis iam ajn antaŭe: “Ĝis mia 46a vivjaro mi ne publikigis eĉ unu libron, kaj de la 47a ĝis la 51a mi publikigis dekon.”

La eldonado komenciĝis en 1937, jaro en kiu Brazila Spiritisma Federacio kreis Esperantan fakon, kiun Ismael estris ĝis sia forpaso, en 1969. Pasis 25 jaroj de la frua periodo, kiam Abel eklernis la lingvon sekve de la propagando entreprenita de la klubo “Junularo”, ĝis la komenco de la eldona agado de Ismael. Sed iam ĵetita fruktodonis abunde multe pli poste, el la transmondo, favore al Ismael mem.

La sufiĉe konata *triobla idealo*, devize vortumita per *Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto*, verŝajne aperis la unuan fojon en alia letero de Abel Gomes, destinita al la nevo. Eĉ la vortordo estis komence alia. En la dirita letero⁶, mediume skribita de Chico Xavier la 30an de oktobro 1948, legeblas *Evangelio, Esperanto kaj Spiritismo*. Nur poste, en alia letero⁷ de Abel la devizo reaperas en la poste tradicia vortordo: *Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto*. Ne hazarde la aŭtoreco de la trivorta esprimo estas ofte atribuata al Ismael.

Dum dekoj da jaroj li diskonigis kaj intense laboris sub la menciita *ideal*o.

Kampanjo Abel Gomes kontribuos al la semado. Vi povos kontribui per libroj aŭ per monsumo. La regularon vi trovos en la retejo de BAES⁸.


Inspiru nin la jena diraĵo de la spirito d-ro Bezerra de Menezes: “Libro, kiu konsolas kaj instruas estas kvazaŭ fonto fluanta sur la Tero el la ĉielo.”⁹ ■

Notoj

1. <https://www.febnet.org.br/wp-content/uploads/2012/06/Abel-Gomes.pdf> (vizito 10 jun 2022).
2. Numeroj de la 16a de septembro 1934 kaj junio 1945.
3. Ismael Gomes Braga, *Veterano?* 2a eld. Rio-de-Ĵaneiro: KKE, 1965, p. 9.
4. La unua eldono de *Veterano?* aperis en 1937, la dua, lasta eldono, en 1965. Ĝi estas la unua libro originale verkita en Esperanto kaj publikigita en Brazilo.
5. *Reformador*, junio 1945.
6. *Reformador*, novembro 1948.
7. *Reformador*, novembro 1949.
8. www.baes.org.br
9. Pluraj aŭtoroj, *Dicionário da Alma*, 5a eld. Rio-de-Ĵaneiro: BSF, 2008, p. 232).

ĈEESTA BRES, FINFINE!

La tempo pasis tre rapide... Pandemio trafis la mondon, kaj dume du Brazilaj Renkontiĝoj de Esperanto-Spiritistoj okazis virtuale. Ĉeesta BRES atendas nin en 2023!



11a BRES, okazinta je la unua fojo virtuale, en 2021.



Przemysław Paweł Grzybowski (Pĥemo), pola Esperanto-spiritisto, pedagogo kaj aŭtoro. Li prelegis pri sia samlandano Janusz Korczak dum la 12a BRES, 2022.

La 11a BRES okazis per Zom-kunveno en la 15a de aŭgusto 2021. Okazis Ĝenerala Asembleo en kies kadro i.a. elektiĝis nova estraro de BAES (mandato 2021-2024). La ĉeftemo estis "Esperanto kaj Spiritismo: Originoj kaj Pioniroj". Aliĝis al la evento 87 personoj el pluraj urboj kaj tri landoj.

La 12a evento okazis en la 24a de aprilo virtuale, kiel en la antaŭa jaro. La ĉeftemo estis

"Jen semisto eliris, por semi" (Mateo, 13:3). Prelegis pri la ĉeftemo nia samideano Pedro Jacinto Cavalheiro, spiritisto kaj konata movada aktivulo. Prelegis ekzemple la pola pedagogo Pŝemo. Partoprenis la eventon ankaŭ Eldonejo Lorenz, kiun reprezentis s-ro Affonso Soares. Aliĝis al la evento 64 personoj el pluraj urboj kaj du landoj.

UBERLÂNDIA ATENDAS VIN


La duan fojon




En Uberlândia okazis en 2007 la 2a BRES. La urbo ankoraŭfoje invitas la eventon kaj bonvenigas aliĝojn de ĉiuj samideanoj el iu ajn parto de la mondo. **Ĝi okazos la 22an kaj 23an de aprilo 2023.**

La decido pri ĉeesta evento estas farita ĉefe danke al la mildiĝo de la pandemio. La estraro de BAES ŝatus kapti la okazon por proponi ŝanĝojn en la statuto de la Asocio, ĉar

ŝanĝoj povas esti aprobitaj sole nur kadre de *fizika* asembleo. Jen unu el la ŝanĝindaj punktoj. En la retejo de BAES estos aliĝilo ekde oktobro, krom aliaj informoj pri la Renkontiĝo. Ni tre ĝojos revidi aŭ konatiĝi kun vi! Ĝis poste!



Scenoj el la 11a BRES, 2021.



Kelkaj partoprenintoj de la 12a BRES, 2022.

PReSITA SUPLEMENTO al nia gazeto



Hejma Evangelia Studo, aŭ *Evangelio en la Hejmo*, konsistas en studado de la evangelio de Jesuo en familia rondo. Estas grave emfazi, ke tiun studadon oni povas entrepreni ankaŭ unuope. Tiu familia kunveno estas tradicie nomata *Evangelio en la Hejmo* reference al epizodo, okazinta antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj en la domo de Petro – unu

el la apostoloj de Jesuo. Tiun epizodon rakontas al ni la spirito Neio Lúcio en la libro *Jesuo en la Hejmo*, medieme skribita de Chico Xavier.

Krom la rakonton, la Suplemento enhavas ankaŭ la procedon, kiel realigi la studon en via propra hejmo unufoje en ĉiu semajno. La eldonaĵo estas senpage elŝutebla el la Kleriĝejo de BAES.

radioj, kiuj ĝin konstitigas, abundeco maskigas ĉe la greno. Tial la Evangelio ne estas dia-konstitigita meze inter la popolamano, sed ĉe la simpla laĝejo de paŝtisto kaj bestoj.

Simono Petro fiksis sur la Majstro siajn humilajn kaj brilajn okulojn kaj, ne trovinte la ĝustajn vortojn por sin esprimi, murmuri kun li...

Fariĝu via voĉo
Tiam, invitan
terparolo kaj ne
hajopoj de saĝec
kulturo de la Ewa

Spirita alitor
El la libro Jes
elidonta de E
Braziljo, 201



Kristana Kulturo en La Hejmo

Babilono

Pleniĝis je steloj la firmamento kadre de lumbela nokto, kiam Jesu-Kristo, provintore gantigita en la domo de Simono Petro, venis la ŝanĝataj akrobatojn kaj, kvazaŭ Li volus ŝanĝi la direkton de la konversacio, kiu fariĝis stercita kaj malpli edifa, bukone parolis:

— Simono, kion faras fikŝkaptato, kiam li direktiĝas al vendoplaco kun la ŝtataĝaj laboretistoj?

La apostolo prenis dum momento kaj respondis hontema:

— Majstro, kompreneble, li elektas la pliej bonajn kaj belajn fiŝojn, ĉar neniu alietas veniaĵojn de fikŝkaptado.

Jesu-Kristo ridetis kaj demandois desuave:

— Kaj arguldiŝate? Kion li faras por bone plenumi la taskon al kiu li sin proponis?

— Certu, Simjoro — rediris, ne sen surprizo, la fikŝkaptato — li meditas la anglon kaj konfirmigas ĝin al sia intenco.

Kun fulsorberita kaj kompetenta rigardo, la Cielo Amiko insistis:

— Kaj kiel procedas ĉarĝantato por atingi la intencatan celon?

En na simplajn, Simono Petro kaj respondis:

— La prilaboras la lignon, uzas aldoni kaj manĝigitajn, martelon kaj ŝarĝon. Alimaniere, li ne perŝikigas la krudajn lignoparcon.

Jesu-Kristo alimaniere dum som da tempo kaj ridive aldonis:

— Tia ankai estas la hejmo ankai la memda. La hejmo haito

Papaj Evangelioj Studo | 7

Fundamento

estas la unua lernejo kaj la unua templo de la animo. Ĝi estas aŭtentika ekspozitejo de karakteroj por la homuna vivo. Se komercito elektas la varon kaj liguldiŝate ne sukcesas prepari burkon ne meditante la liguldiŝate al sia celo, kiel esperi sekuran kaj trankvilan komerciton se la hejmo ne perŝikigas? La monda paco konstruiĝas sub la tegmento en kiu ni rifugiĝas. Se ni ne lernas vort parce interne de kvar muroj, kiel esperi harmonion inter nacioj? Se ni ne haitiĝas ankai la pliej proklamita fratino kunigita al sia ŝtataĝa haito, kiel respikti la Eternan Patron, kiu tajnas al ni for?

Jesu-Kristo ekrigardis la modestan fambrun kaj dardigis:

— Simono Petro, ni ekstarigu ĉi tiu, ŝikali ŝik, kiu sin serĉas.


Eratas antaŭdun, kun nova harmonio. Por via paco, la tablo de via domo estas ĝa hejmo. Sur ĝi vi ricevas de la Supero la ŝtataĝa paco.

Kial ne instali ŝikali ĝi la kulturojn de la fikŝejo kaj paco en la konversacio kaj penso? La Patro, kiu, per la grando, donas al ni la milidun por la gnomia ordnd al ni la humo per la Cielo. Se helico estas la ekspanso de la

La monda paco komenciĝas sub la tegmento en kiu ni rifugiĝas.

Paĝoj de la suplemento.

Elŝutu senpage



Lucas Gervásio, membro de BAES.

Ĉefartikolo | La Redakcio

Esperanto kaj spiritismo Frua Periodo kaj Pioniroj



Numero de *Reformador* en kiu aperas la fama artikolo de J. C. Chaigneau pri spiritismo kaj Esperanto.

Ĝoje ni prezentas al vi la rezulton de la lastatempaj esploroj pri la fruaj rilatoj de Esperanto kaj spiritismo. Multaj personoj kontribuis al la entrepreno. Ŝlosilan helpon ni ricevis de Fábio Fortes, kiu helpis ne nur per esplorado mem, sed ankaŭ per tradukado de multe da franclingvaj materialoj sen kiuj la nuna artikolo ne povus esti finredaktita.

La esploro estas tutnova. Ni klopodis verki plej skrupule kaj diligente. Ni ĝojos ekscii pri eventualaj misoj aŭ malfirmaj punktoj. Ne hezitu kontakti nin!

Se vi, leganto, eventuale tradukos ĝin al nacia lingvo, bonvolu sciigi nin, ni petas.

Koran antaŭdankon!

En Brazilo, la temo Esperanto kaj spiritismo aperis la unuan fojon plej verŝajne en *Reformador*, organo de Brazila Spiritisma Federacio (BSF), en numero de la 15a de februaro 1909¹. La redakcio republikigis artikolon de J. Camille Chaigneau² (1849-1918), krom mallongan antaŭparolon, kiu informas, ke la teksto aperis unu jaron pli frue “en la revuo de Gabriel Delanne” kaj laŭvice en la revuo *La Vie d’Outre-Tombe*, el Charleroi, Belgio.

Foliumante la numerojn de la franclingva gazeto de G. Delanne (1857-1926) el 1908, nome *Revue Scientifique et Morale du Spiritisme*, ni ne trovis la menciitan artikolon. La teksto aperis efektive ne en 1908, sed en la numero de decembro 1907. Oni povus supozi, ke la enkonduko al la artikolo de Chaigneau en *Reformador* estis verkita en 1908. Tiam la redaktinto ĝuste indikis la “pasintan jaron” kiel jaron, kiam la teksto aperis, kaj okaze de ĝia publikigo en la organo de BSF la noto fine restis senŝanĝa de unu jaro al alia. Tamen, kiel eblis hipotezi iom pli poste en ĉi tiu artikolo, unu punkto en la antaŭpa-

rolo de la redakcio sugestas, ke la malĝusta informo estas rezulto de simpla misredakto.

Surprizis nin ankaŭ la originala titolo, *Spiritismo kaj Lingvo Internacia*, kiu diferencas de *Esperanto kaj Spiritismo* – titolo, kiun elektis la organo de BSF. En la enkonduko legeblas, ke *Reformador* alprenis la saman titolon, kiu aperis en la teksto represita en *La Vie d’Outre-Tombe*. Ĉi tiun informon ni ne povis konfirmi, ĉar en la reto ni ne trovis ekzemplerojn de la menciita gazeto³.

Krom la titolo, ankaŭ la enhavo mem de la artikolo estas ne identa. Kredeble pro manko de spaco en la revuo, en *Reformador* ĝi estas draste mallongigita kaj reverkita surbaze de la ĉefaj ideoj el la originala teksto. Pri la mallongigo la redakcio nenion diras. Tamen, la kialo de la enpresado de la artikolo estas klare esprimita:

Por spiritistoj, kiuj bataladas por realigo de la universala frateco, ne povas esti indiferenta la alpreno de ia lingvo egale universala, kia Esperanto. Tiucele ĝi estas plej grava elemento, pro tio, ke ĝi faciligas la alproksimiĝon

de la popoloj – al kio kontraŭstaras nuntempe, kiel supermezura barilo, ne nur teritoria dividiteco, sed ankaŭ la diverseco de la lingvoj parolataj en la mondo.

Laŭ la redakcio mem, alia faktoro motivis la represon de la teksto:

Nun, kiam nova Kongreso de Esperanto estas realigata en San-Paŭlo, ŝajnas al ni oportune eksterigi nian simpation por tiu movado, kiun de kelkaj jaroj subtenas multenombra grupo de aktivaj kaj sindonaj homoj, el nia kaj el aliaj landoj.

La redaktoro aludas la 2an Brazilan Kongreson de Esperanto, okazintan de la 16a ĝis la 19a de januaro 1909⁴. La mencio pri la evento malkonfirmas la supozon pri noto verkita en 1908 kaj senŝanĝe presita en 1909, krom se ĝi estis poste nur kompletigita. Iel ajn, aŭ la redaktinto dekomence notis erare, ĉu en 1908, ĉu en 1909, aŭ li simple ne ĝisdatigis la noton sojle de nova jaro. Flanka demando. Ni prezentu nun la lastan alineon de la antaŭparolo al la teksto de Chaigneau:

Ni ne povus esprimi nian opinion pli bone, ol per transigo de la sekvanta verkaĵo en niajn kolumnojn. Ĝi estis publikigita en la pasinta jaro [1907] fare de nia samdoktrinano Camillo [ĉi tiel] Chaigneau, en la revuo de Gabriel Delanne, kaj represita de La Vie d'Outre-Tombe, el Charle-roi, kun la sama titolo, kiun ni alprenis.

La originala teksto de Chaigneau, kiel ĝi aperis en la revuo de Delanne, en 1907, estas finfine plene tradukita el la franca al la portugala kaj al Esperanto fare de la brazila Esperantisto Fábio Fortes kaj la franco Mark Ĵiro respektive.

En nia revuo ni aperigos sole la mallongigitan version el 1909, kiu, laŭ nia scio, publikiĝas la unuan fojon en la Internacia Lingvo (la plenan artikolon ni aperigos en la retejo de BAES). Jen ĝi:

Esperanto estas artefarita lingvo kreita de D-ro Zamenhof. Ĝi havas adeptojn en la tuta mondo (pli ol 80.000), kaj certigas sian kreskantan viglecon, siajn grandegajn progresojn per okazigo de elstaraj kongresoj, per siaj facileco kaj esencaj kvalitoj.

Favore al ĝi ekzistas argumento, kiu ĉion solvas: ĝi estas parolata.

Ĝi ne minacas iun ajn nacian lingvon, kaj ĝi estas elektita de komisiono el saĝuloj kiel internacia helplingvo, rekomendinda por alpreno fare de la diversaj landoj. Pro tio la plimulto el la universalecaj movadoj komencis utiligadi Esperanton.

La plej gravaj dokumentoj devenantaj el la plej diversaj landoj de la mondo povas esti kunigataj en komunan revuon kaj, danke al neŭtrala lingvo, ili estos atingeblaj por ĉiuj, kiuj studas samspecajn demandojn. Se oni pensas pri la kvanto da faktoj, kiujn ni, spiritistoj ne ekkonas pro manko de traduko, kaj pri la malfrueco de niaj dokumentoj kaŭze de la traduklaboro, ŝajnas, ke spiritismo devas vere interesigi pri la kreo de centra revuo en kiun la plej reliefaj faktoj povos kuniĝi danke al lingvo komuna por ĉiuj.

Estas necese do, ke spiritismo profitu tiujn avantaĝojn. La sola uzado de la lingvo estigas fratan ligan inter ĉiuj Esperantistoj kaj faciligas la interkomunikon de skribaj aŭ parolaj doktrinoj. Ĝi estas absolute necesa por ĉiu sincera ideo.

La aliĝo de iu kolektivo al Esperanto estas por la lingvo mem ia kreskiga forto, kaj reciproke, tiu kolektivo ĝuas la komunikan forton esence propran al Esperanto.

Se ni volus serĉi la originon de ĉi tiu lingvo, ni konstatus, ke ĝi aperas kiel rezulto de kunlaboro kun la nevideblo.
[Nia grasigo]

Tia senpersoneco konsistigas ĝian superecon; tia asistado faras ĝian altirforton.

Ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de progreso kontribuos al ĉi tiu verko, tiel bela kaj tiel fekunda por la reciproka proksimiĝo de la homoj. Esperanto posedas la flamon de frateco; ĝi vivos plu.

Koncernas la spiritistojn profiti ĝiajn vigligajn aspirojn kaj al ĉi tiuj aldoni iom da vicleco.

Escepte de la lasta alineo, kiu estas tute parafraza, ĉio cetera estas retrovebla en la originalo, ĉu alivorte, ĉu preskaŭ samvorte.

La “kunlaboron kun la nevideblo”, pri kiu intuciis Chaigneau, la spirito Francisco Valdomiro Lorenz konfirmis kvindek jarojn poste pere de Chico Xavier. En la 19a de januaro 1959, Chico mediume skribis mesaĝon, aŭtoritan de Lorenz, kies titolo

estas “O Esperanto como Revelação” (Esperanto Kiel Revelaĉio). BSF publikigis ĝin en *Reformador* el aprilo de la sama jaro. Sekvas la koncerna parto de la teksto, tradukita de s-ro Benedicto Silva:

*Helpata de multenombraj grupoj da kunlaborantoj, kiuj akordis kun lia idealo, la geniulo de la homara kunfratigo, kiun ni konas per la nomo Lazaro Ludoviko Zamenhof, inventis, per la dia inspiro, la miregindan Esperanton, determinante la starigon de respektivaj akademioj en la spiritalaj sferoj ligitaj al la plej kleraj nacioj de nia Planedo.*⁵

La plene tradukita teksto de Chaigneau estas tro longa por nia jam multpaĝa *Gazeto*. Ni nun prikomentos unu el la temoj, kiuj ne aperas en la mallonga versio de la artikolo.

Chaigneau opinias, ke la kreo de *centraj organizaĵo kaj revuo* estus avantaĝa ekzemple por spiritismo. Tia organizaĵo fondiĝis sub la nomo *Internacia Unuiĝo por Studado de Psikismo per Esperanto* – mallonge *Esperanta Psikistaro*, kaj en 1911 ĝi eĉ okazigis en Antverpeno, Belgio, *subkongreson* kadre de la 7a

Universala Kongreso de Esperanto. En tiu sama jaro, “per la zorgoj de la Federacio Spiritista Belga”, eldoniĝis *Raporto pri la Subkongreso de Esperanta Psikistaro*, kiu priskribas tri kunsidojn. Dum la unua, okazinta dimanĉe en la 20a de aŭgusto ĉe “Café Anselmo”, la belga Esperantisto August Stas⁶ (1882-1948), sekretario de la Unuiĝo, prezentis ĝian historion:

Ĉe la belga spiritista kongreso de Lieĝo antaŭ kvar jaroj [1908], mi proponis la uzadon de Esperanta lingvo ĉe ĉiuj rilatoj kun la eksterlando. Tiu deziro, presita en “Le Messenger” venis sub la okulojn de S-ro Chaigneau el Parizo, kaj tiu Sinjoro tiam al mi skribis leteron en kiu li malvolvis al mi sian ideon pri fondo de internacia spiritista asocio.

Ankaŭ Chaigneau rakontas pri tiu frua periodo. La 7an de novembro 1908 li sendis al Gabriel Delanne (1957-1926) leteron kun sciigo pri la fondo de Esperanta Psikistaro kaj franclingvan tradukon de ties “programo”, aŭ laborplano:

En la raporto pri la spiritista kongreso de Lieĝo, publikigita en Le Messenger de la 15a de ju-



J. C. Chaigneau
(1849-1918)



A. Stas
(1882-1948)

Pri Karlo Schriewer ĝis nun ni ne trovis biografiajn informojn, nek foton.

nio, vi povis rimarki la du jenajn notojn: “Propono de S-ro A. Stas, el Antverpeno, pri la uzado de Esperanto por internaciaj rilatoj inter spiritistoj”; “La Kongreso estis fermita kun deziro rilate la formadon de internaciaj spiritismaj Federacioj utiligontaj por tio Esperanton.”

Kompreneble tiu informo vekis ĉe mi la deziron ekkoni S-ron Stas (...). Tiu, kiu estas tre aktiva junulo, montriĝis tute preta tuj kunlabori por estigi la bazojn de internacia spiritista esperantista Unuiĝo (...).⁷

En la raporto de la menciita kongreso legeblas, ke la “peto pri formado de Internacia Federacio”

– ne multenombre, kiel skribis Chaigneau – estas parto de la “deziroj” esprimitaj de la Perfektiga Sekcio, kaj unuanime aprobitaj de la asembleo: “(...) la kongreso petas la formadon de Internacia Federacio uzonta Esperanton kiel pontolingvon. (Stas).”⁸ Pli frue en la kongresa raporto troveblas propono de Stas mem pri kreo de “komisiono”, kadre de la Belga Spiritisma Federacio, kiu okupiĝos pri disvastigo de Esperanto “inter la adeptoj” kaj samtempe agados por laŭeble konigi la Federacion al eksterlando.

Superrigardo al la diversaj proponoj pensigas pri tio, kiel finfine kreiĝis ia *Unuiĝo*. Chaigneau

neau, en sia teksto de 1907 tuŝas la temon *centra organizaĵo*. Siavice, kadre de la Kongreso de Lieĝo, Stas proponas la kreon de *komisiono*, kiu funkcius kadre de la Belga Spiritisma Federacio, kaj unu el la sekcioj de la kongreso mem petas la establilon de *Internacia Federacio*. Laŭvice, Chaigneau skribas al Stas, post la kongreso, kaj prezentas ideon pri *internacia spiritista asocio*. Laste, en sia letero al G. Delanne, pli frue menciita en ĉi tiu artikolo, Camille rakontas pri kunlaboro por starigo de *internacia spiritista esperantista Unuiĝo*. Nu, kaj Stas kaj Chaigneau rakontas tion, kio sekvis la decidon pri la fondo. Jen kion diras Camille:

*S-ro Stas publikigis anoncon pri la afero en tre diskoniĝinta periodaĵo: Esperanto, el Ĝenevo. Sekve alvenis kelkaj aliĝpetoj, el Nederlando, Hispanio (Barcelono kaj Ciudad Rodrigo), Portugalio kaj Moresnet-Neutre (...).*⁹

El Moresnet-Neutre, kie fondiĝis Esperantista kolonio nomata kiel *Amikejo*, alvenis aliĝpeto de Karlo Schriewer. Chaigneau rakontas plu:

S-ro Schriewer rimarkigis nur

tion, ke la spiritistoj esperantistoj estis ne multenombraj por povi ekde nun konsistigi ian internacian esperantistan unuiĝon (...). Sekve de interŝanĝado de leteroj, ni akceptis parte lian opinion – mi diras “parte”, ĉar mi ne mencias ĉi tie iujn detalojn de lia kontraŭpropono. Estis decidite, ke anstataŭ alvoki nur la spiritistojn nia klopodado estos direktata al ĉiuj, kiujn la psikismaj studoj interesas. [...].

La alprenita nomo por iom da tempo estis “Internacia unuiĝo por psikisma studado per Esperanto”; ĉar tiu formo estis longa kaj ne tre oportuna, tial ni el ĝi devenigis subtitolon, kaj ni prenis por titolo la pli mallongan kaj praktikan vortumon: Esperanta Psikistaro.

Se la propono de K. Schriewer estis tiel decidiga, lia kontakto ne povus okazi post la aperigo de la anonco en la revuo *Esperanto* fare de Stas, sed antaŭe. La rakonto de Stas en la jam menciita raporto de la subkongreso estas pli konsekvenca. Laŭ la sekretario de la tiam fondonta *Unuiĝo*, same kiel Chaigneau, ankaŭ Schriewer kontaktis lin post kiam aperis en *Le Messenger* la propono de

Stas pri “uzado de Esperanta lingvo ĉe ĉiuj rilatoj kun la eks-terlando”. August Stas “aranĝis vojaĝon al tiu bela amikeja lando kaj diskutis longtempe kun Schriewer”.

Pri lia “kontraŭpropono” Stas rakontas plu: “Ĉar tiu propono estis akceptata, ni faris unuan sciigon en la gazeto ‘Esperanto’ el Genève, kiu afable malfermis siajn kolonojn por niaj sciigoj.”¹⁰

La menciita sciigo publikigis en la 15a de oktobro (tiam revuo *Esperanto* aperis dufoje monate). En la numero de la 1a de decembro legeblas dua anonco, kiu jam enhavis la nomojn de la delegitoj (J. C. Chaigneau, K. Schriewer kaj A. Stas) kaj de la

honora prezidanto, nome Émile Boirac, tiama prezidanto de la Lingva Komitato, kiu fariĝos poste la nuna Akademio de Esperanto. Pri la prezidanteco de Boirac, Chaigneau rakontas en sia letero al Delanne: “Ni proponis honoran prezidantecon al S-ro Boirac, kion li ĝentile akceptis. Tiu akcepto signifas valorgan apogon, pro la tre speciala estimo, kiun S-ro Boirac havas en la Esperantista mondo.”

En la biografia artikolo pri E. Boirac, publikigita en la verko *Nia Diligenta Kolegario*¹¹, legeblas ke en 1912 li “kunfondis Mondan Asocion de Spiritismaj Esperantistoj kaj iĝis ĝia unua prezidanto”. Ankaŭ Ismael Gomes Braga (1891-1969), elstara



Ismael Gomes Braga
(1881-1969)



Émile Boirac
(1851-1917)

brazila aktivulo kaj iama estro de la Esperanta fako de Brazila Spiritisma Federacio, referencas al la sama jaro en artikolo publikigita en la septembra numero de *Reformador*, 1942:

Ni reiru al la pasinteco. Tio estis en 1912. Pro iniciato de spiritistoj el Francio kaj Belgio ni fondis mondan asocion de spiritistaj Esperantistoj. Prezidanto, Émile Boirac; poeto de niaj idealoj, Camille Chaigneau.

La jaro 1912 estas menciata plurfoje en la teksto. Tamen, diversaj dokumentoj el pluraj fontoj nekontesteble atestas ne pri 1912, sed pri 1908. Tuj en 1909 *Reformador* mem raportas dufoje pri Esperanta Psikistaro, en la numeroj el marto kaj junio. Kial do 1912 estas, laŭ Halina, Korĵenkov kaj Ismael, la fondojarro de la Asocio? Nu, por respondi tiun demandon koncerne la aŭtorojn de la verko *Nia Diligenta Kolegario* necesus trarigardi la bibliografion indikitan fine de la artikolo pri Boirac. Tiel ni eventuale malkovrus, kiu aŭ kiuj el la esplorfontoj referencas al 1912. El la bibliografia verkaro de la artikolo ni disponas nur pri *Enciklopedio de Esperanto*, el 1933,

sed ĝia “rubriko” pri Boirac ne mencias lian honoran prezidantecon. La “rubriko” pri okultismo mencias Esperantan Psikistaron, sed prisilentas ĝian fondodaton.

En 1910 la “Unuiĝo”, per la helpo de “Belga Federacio Spiritista”, eldonis verketon, kies titolo estas *Kunlaborada Verketaro*. Temas pri kolekto de artikoloj ĉefe tradukitaj en Esperanton fare de A. Stas kaj J. C. Chaigneau. Al la kolekto estas aldonita la enhavo de poŝtkarto sendita de Zamenhof, el Varsovio, en la 12a de novembro 1908, do iom post la apero de la anonco pri la Unuiĝo en la revuo *Esperanto*:

*Al Esperanta Psikistaro,
Karaj Sinjoroj,*

Kun plezuro mi ricevis vian sciigon pri la fondo de la “Esperanta Psikistaro”.

Ke mi plene aprobas la fondon de via Unuiĝo, pri tio vi komprenoble, ne povas dubi. Al la Esperanta Psikistaro mi sendas mian plej sinceran saluton kaj bondeziron.

Via L. L. ZAMENHOF¹²

Antaŭ tiom da evidentaj faktoj estas neeble pravigi ekzemple la aserton de Ismael pri la

jaro 1912, tiom malpli, ke li iel partoprenis en ĝia fondo. Li mem asertas, ke li fariĝis spiritalisto¹³ ĝuste en 1912, ne antaŭe. Kial do li tiel insistas pri tiu jaro? Kial li skribas “ni fondis”, se la fondo okazis jarojn pli frue? Kial li asertas, ke fondiĝis *Asocio de spiritistoj* anstataŭ *Unuiĝo de psikistoj*? Respondojn al tiuj demandoj ni povus nur konjekti. Elementoj ne mankas. Tamen, la analizado de ili igus ĉi tiun artikolon neoportune pli longa.

Restas al ni prezenti eĉ se koncize la vivon de la eminenta nekonato J. C. Chaigneau.

Chaigneau estas menciita en almenaŭ du numeroj de *Reformador* antaŭ 1909. En la numero de la 15a de majo 1892 legeblas i.a. mallonga citaĵo el parolado farita de li ĉe la tombo de Allan Kardec okaze de ties mortodatreveno. En la numero de la 15a de majo 1895 la redakcio raportas pri la ricevo de la unuaj numeroj de la revuo *L'Imoraliste* (poste *L'Humanité Intégral*), redaktita de Chaigneau kaj Emile de Rienzi, kvankam tra la teksto la aŭtoro sin turnas ĉiam al unu, kiun li nomas jen “nova” jen “simpatia

kunulo”. Kredeble la redaktoro alparolas tiun, kies nomo respondecis pri la sendo de la revuoj. Efektive “nova” estas ne Chaigneau, sed Emile. Ĉu ja temas pri ĉi tiu, ni ne certas.


La solan portugallingvan fonton de informoj pri Camille Chaigneau ni trovis en *Reformador* mem. Temas interalie pri mallonga prezento de kelkaj trajtoj de lia karaktero. La artikoleto ne estas subskribita. Supozeble ĝin verkis Ismael Gomes Braga, kiu tiam, en majo 1959, estris la Esperantan fakon de BSF. La ceteraj fontoj trovitaj de ni estas franclingvaj. Danke al la helpo de nia “duobla samideano” Fábio Fortes, ni povas finfine, post pli ol cent jaroj, iom ekscii pri tiu pioniro. Kompleta biografio skizo legeblas en Vikipedio ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la portugala kaj franca lingvoj.

Chaigneau naskiĝis en la 22a de januaro 1849 en Villeneuve-la-Comtesse, Francio. La informon pri lia naskiĝurbo ni trovis en blogo pri la dirita urbo, kie la patro de Chaigneau, la kuracisto Alexandre Chaigneau iam oficis kiel urbestro. D-ro Alexandre subskribas kelkajn artikolojn en la *Spiritisma Revuo*, fondita de Allan Kardec. Kelkajn jarojn post

la forpaso de d-ro A. Chaigneau, *Reformador* el aprilo 1892 informas pri lia elkarniĝo, kaj priskribas lin kiel “respektindan spiritiston el la unua horo”. Ankaŭ la filo studis medicinon, sed ni ne scias, ĉu li havis kuracistan karieron. Ni malkovris tamen, ke dum la Alzaca-Lorena milito (1870) li servis kiel ambulancisto.

Camille estis poeto kaj verkisto. Kiel la patro, ankaŭ li aperas en la *Spiritisma Revuo*. En numero de januaro 1912 legeblas spi-

ritualisma teatraĵo verkita de li. Chaigneau aŭtoras interalie la poemaron *Les Chrysanthèmes de Marie*, kies poemoj estas spiritualismaj. En Parizo, kie li loĝis, li komencas kunlabori kun Gabriel Delanne ekde 1883, kiam lanĉiĝis la revuo *Le Spiritisme*. Delanne, kiu estis unu el ties kunlaborantoj, baldaŭ fariĝis ĝia ĉefredaktoro¹⁴. Camille subskribas tekston al la legantoj tuj komence de ĝia unua numero. Legeblas respektive en la biografio de Delanne¹⁵



Unua numero de *Le Spiritisme*.

kaj en *Reformador* el aprilo 1957, ke Chaigneau paroladis ankaŭ okaze de la entombigo de d-ro Alexandre Delanne kaj de la edzino de Kardec, Amélie Gabriel Boudet. Cetere, Camille prezidis dum du jaroj (1888-1889)¹⁶ la Parizan Societon de Spiritismaj Studoj, fonditan de Kardec mem.

Kvankam *Enciklopedio de Esperanto* atribuas la fondon de Esperanta Psikistaro al A. Stas, la sekretario de Esperanta Psikistaro mem asertas, ke Chaigneau “estas la vera iniciatinto de la idemovado kiu estas nomata Esperanta Psikistaro.”

Indas legi parton de tio, kion pri Camille asertas Ismael Gomes Braga en la menciita artikoleto el *Reformador*¹⁷:

La tuta verko de Chaigneau ŝajnis perdita. La plej kruelega naciismo ekregis en Francio kaj likvidis la naskiĝantan movadon.

La firmo Hachette et Cie ĉesigis ĉiujn siajn eldonojn en Esperanto kaj likvidis la stokon de libroj en la internacia lingvo, pro postulo de la ŝovinistoj.

La spiritistoj Esperantistoj estis komencintaj publikigi malgrandan revuon el kiu aperis nur tri numeroj, presitaj en Belgio (...).

Chaigneau estis tro bela por sia tempo.

Tia malfavora cirkonstanco estas i.a. sekvo de la unua mondmilito, kiu eksplodis en 1914. La *Revuo de Esperanta Psikistaro* aperis ne tri, sed dufoje, en januaro kaj aprilo 1913. Pri ties lanĉo *Enciklopedio de Esperanto* eĉ dubas.

“Tamen”, diras plu Ismael en la ĵus citita artikolo, “Chaigneau kaj liaj kunuloj el 1908¹⁸ ne mortis por ĉiam. Ili devas jam iradi ie rekomencante la taskon interrompitan de la homa nekompreneo.” ■

— Postparolo —

Per ĉi tiu artikolo ni solvis la demandojn starigitajn en la antaŭa numero de nia revuo. Necesas rimarkigi, ke la jaro en kiu aperis la ideo pri organizita agado, laŭ la raporto de A. Stas, estas ne 1907, kiel ni skribis, sed

1908 (vidi paĝon 10 de la unua numero de nia organo). Cetere, Stas klare mencias la Kongreson de Lieĝo. Ni tamen kalkulis ekde la antaŭa jaro, do tuj antaŭ la subkongreso, tio estas, 1910, kaj malfeliĉe eraris.



La du numeroj de *Revuo de Esperanta Psikistaro* (januaro kaj aprilo 1913 respektive). Ambaŭ disponeblas en la Klerigejo de BAES.

Indas rimarkigi duan malfirman punkton, nun rilate al la *Revuo de Esperanta Psikistaro (REP)*. La redaktinto de la rubriketo *Pri la Unua Eldono* (de *Kunlaborada Verketaro*), asertas, ke pri *REP* li nenion trovis ekz. en la katalogo de la aŭstria Esperantomuzeo. Temis pri simpla preteratento. Dum estontaj esploroj la du numeroj de la *Revuo* estis trovitaj tie. Tamen ili ne estis virtuale legeblaj. Danke al malavara helpo de nia samideano Jader Rodrigues ambaŭ

numeroj estis elektronike akiritaj. Laŭvice ankaŭ Affonso Soares kontribuis. Li sendis al nia redakcio fotokopiaĵon de la du numeroj, kiujn li iam trovis en la biblioteko de BSF, en Rio-de-Janeiro.

Alia rimarkigo: La kolekto de artikoloj, eldonita de EP en 1910 nomiĝas *Kunlaborada Verketa-ro*, ne *Kunlabora Verketaro*, nek *Esperanta Verketaro*, nek *Esperanta Psikistaro*, kiel ni erare skribis kelkloke en la unua numero de nia Gazeto. ■

Danko kaj... detalo

Ni elkore dankas al Gustavo Magalhães (membro de BAES nuntempe loĝanta en Francio) kiu kompleze iris ĝis antaŭ la adreso de J. C. Chaigneau, en Parizo, por ĝin foti!

Hazarde ni rimarkis ŝildon ĉe la enirejo. Per la servo de Guglo-strato ni iom pene povis legi tion, kio estas skribita:



“Ĉi tie loĝis Edmond About, verkisto kaj artokritikisto (1827-1885), kaj poste D-rino Marthe Gautier, kiu en 1959 malkovris la Down-sindromon.”

Notoj

1. Tiam *Reformador* aperis dufoje monate. Ekde januaro 1938 ĝi fariĝis monata periodaĵo. La redakcio klarigis, ke la ŝanĝon de la aperofteco kaŭzis la altiĝo de la prezo de la papero, kiun la Federacio importis el Eŭropo.


2. Jean Camille Chaigneau. En biografia teksto pri lia patro, Jean Alexandre Chaigneau (1807-1892), publikigita en retpaĝo pri la franca urbeto Villeneuve-la-Comtesse (kies urbestro li estis), J. Camille Chaigneau aperas kiel Jean Alexandre Camille Chaigneau (retpaĝo <https://mallonge.net/pm>, vizitita 20 apr 2022).

3. “En 1894, s-ro Charles Fritz, okulisto el Charleroi [Belgio], aperigis la monatan ĵurnalon ‘La vie d’Outre-Tombe’ (La Transtomba Vivo), kiu fariĝis pli malfrue ‘Revue Spirite Belge’ (Belga Spiritisma Revuo) kaj la oficiala organo de Belga Spiritisma Unio. Tiu revuo ricevis plurajn nomojn dum sia ekzistado, kiel ekzemple ‘Spiritualisme Moderne’ (Moderna Spiritualismo) kaj ‘Le Messenger’ (La Mesaĝisto), antaŭ ol reveni al ‘La Revue Spirite Belge’ (La Belga Spiritisma Revuo) en 1999, okaze de ties refondiĝo.” (La Revue Spirite Belge, aprilo-majo-junio 2019).
4. *Brazila Esperantisto*, organo de Brazila Esperanto-Ligo, 2a jaro, jan-fev 1909, n-roj 5-6.
5. *Esperanto Kiel Revelacio*, 2a eld. Araras: IDE, 1985, p. 147.
6. Iufoje ankaŭ “Stasse”.
7. *Revue Scientifique et Morale du Spiritisme*, novembro 1908, p. 313.
8. Fédération Spirite Belge, *Congrès de Liège*, 7 et 8 Juin 1908, p. 115
9. *Revue Scientifique et Morale du Spiritisme*, novembro 1908, p. 313-314.
10. *Raporto pri la Subkongreso de Esperanta Psikistaro*, 2a eld., 1911, p. 3.
11. Halina Gorecka, Aleksander Konĵenkov, *Nia Diligenta Kolegaro*, Kaliningrado: Sezonoj; 2018.
12. *Kunlaborada Verketaro*, 2a eld., 1911. Zamenhof sendis la poŝtkarton el str. Dzika, n-ro 9, Varsovio.
13. *Almanako Lorenz 1992*, p. 20. Perletero IGB rakontas al Dilermando de Castro, iama prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiel li fariĝis spiritisto.
14. Paul Bodier e Henri Regnault, *Gabriel Delanne, Sua Vida, Seu Apostolado e Sua Obra*. 3a eld. Rio-de-Ĵaneiro: CELD, 2001, p. 30.
15. *Ibid.*, p. 51.
16. *Le Spiritisme*, majo 1889.
17. *Reformador*, majo 1959, p. 110.
18. Tiu mencio de Ismael en la artikolo estas aludo al la teksto de Chaigneau, kies publikigo okazis ne en 1908, kiel asertas *Reformador*, sed en 1907.

LA PSIKAJ FAKTOJ

Artikolo de **Camille Flammarion**, aperinta en *Kunlaborada Verketo* de Esperanta Psikistaro (ĉi tie retajpita laŭ la 2a eldono, 1911, paĝoj 11-14). El la franca en Esperanton tradukis J. C. Chaigneau.

C. Flammarion estis franca astronomo, spiritisto, aŭtoro de dekoj da verkoj. Li rekte kunlaboris kun Allan Kardec – ankaŭ kiel mediu-
mo – kaj estis lia amiko.



Camille Flammarion
(1842-1925)


En la unua numero de nia Gazeto aperis artikolo de Gabriel Delanne, el *Kunlaborada Verketo* de Esperanta Psikistaro. La teksto postulis plurajn notojn, ĉar ni tiam ne disponis pri la originala artikolo... ni eĉ ne supozis, ke ĝi estas ie trovebla. Intertempe ni

hazarde ĝin trovis kaj disponigis en la Kleriĝejo de BAES. Ĉi-foje ni anticipe serĉis la originalon de la teksto de C. Flammarion kaj bonŝance ĝin trovis – kio multe helpis nin en la redaktado de la Esperantlingva tradukaĵo de J. Camille Chaigneau.

LA PSIKAJ FAKTOJ

La fameŝatata astronomo kaj psikisto S-ro Camille Flammarion, petita de ni, respondis per tre afabla letero, dirante: “Mi estas tiom superŝutita de miaj laboroj pri la kometoj, ke estus al mi tute neeble skribi la paĝon kiun vi deziras. Sed kial vi ne elektus mem, tute simple, paĝon de *L’Inconnu* (La Nekonataĵo¹) aŭ de *Les Forces Naturelles* (La Naturaj Fortoj), aŭ de *Uranie* [Uranio, muzo], por ĝin publikigi en Esperanto?”

Pro tiel simpatia bonvolemece, ni petis la permeson elekti tekston kiu, estante sendependa de longa paĝaro, formas pli ĝuste tuĵaĵon. Tial ni tradukis la antaŭparolon skribitan de s-ro C. Flammarion, en 1897, por la unua eldono de *La Survie* (La Postvivo), de la tre estimata (kaj nun tre bedaŭrata) S-ino Rufina Noeggerath.



La Survie (1897)

Sa réalité, sa manifestation, sa philosophie. Échos de l'au-delà.



Rufina Noeggerath
(1821-1908)

Homo devas esti nek kredema nek malkredema.

La kredemo, sen juĝema spirito, igas nin trompataj de iluzioj kaj mensogoj.

La antaŭdecidita malkredemo enfermas la animon en juglandŝelo kaj ĝin blindigas.

Same en ambaŭ okazoj, estas kvazaŭa anemio de la penso, kaj oni demandas sin kiamaniere la homa estaĵo, kies esenco estas pensi, falas en la unuan aŭ la duan el tiuj ekstremaĵoj. Tia estas tamen la ĝenerala okazo.

Nenia problemo, ne esceptante tiujn de la astronomio, estas, certe, pli grava ol tiu de nia spirita naturo. Ĝi estas ĉiam la fama demando de Hamlet: *To be or not to be*, ĉu esti aŭ ne esti! Depost la apero de homo sur la tero, la religioj kaj la filozofioj pretendis solvi la problemon, sed la sfinkso ironie ridetema restis muta, kaj la homaro ŝajnas esti, en ĉiuj tempoj, dividiĝinta laŭ du partioj: la kredantaro kaj la nekredantaro.

De duono da jarcento tamen, la homa scienco, plilarĝiĝante, montras al ni ke la eksteraj ŝajnoj povas trompi kaj ke videbla mondo estas nur la kovrilo de mondo nevidebla. La bela eltrovaĵo de S-ro

Roentgen² igas nuntempe *vidi la nevideblon*. La progreso filozofia de tiu evoluo³ de la scienco ŝajnas al mi eĉ superi la progreson nur sciencon. Ni estis inklinaj konfidi nur al niaj okuloj, al niaj oreloj, al niaj kvin malmultepovaj sentoj, kaj jen la nevideblo aperas al ni. La progresoj de la fiziko permesis konstati la ekziston de la radioj subruĝaj kaj superviolaj, kaj ilin mezuri, tiel malkaŝante sunan spektron dudekfoje pli vastan ol la spektro videbla por nia retino. La fotografio⁴ ekkaptas nun, ĉe la fundo de la spacoj, stelojn kaj malproksimajn universojn absolute nevideblajn per la plej potencaj teleskopoj. La telefono transportas elektre sonajn ondojn per forto kaj rapideco kiuj havas neĉion komunan kun la akustiko. La fonografio fiksas la forflugantajn sonojn de la parolo. Tiuj eltrovaĵoj, tiuj metodoj novaj, tute aliformigas la vulgaraĵojn pri la naturo, kaj invitas nin al profunda analizado de la aĵoj.

Antaŭ nelonge, la vorto antaŭsento ŝajnis ankoraŭ sinonimo de iluzio aŭ de hazarda koincido; la observado de la faktoj montras al ni nuntempe ke la estontaĵo povas kelkafoje esti vidata precize, ĉu en sonĝo, ĉu en somnambulismo propramo-

va aŭ okazigita, ĉu en maldorma stato. La estonto, oni pensas, ne ekzistas. Ĉu tio estas tre certa? La estonto estas ĝerme en la estanto, ĝi estas la konsekvenco de kio ĝin antaŭiras; estas nenia efiko sen kaŭzo; kiu konus la kaŭzojn konus la efikojn. Kio okazos, tio nepre devos okazi, ĉar ĝin determinos ekzistantaj kaŭzoj. La homa volo, kiu ŝajnas al ni dotita de certa libera elektopovo, estas unu el tiuj kaŭzoj; tamen, ĝi jam ne povas decidi, se ekzistas pli altaj kialoj.⁵ Nuntempe, oni ne kredeme agas, akceptante la realecon de la antaŭsentoj kaj de iaj antaŭsciigoj.

Antaŭ nelonge, ŝajnis ankoraŭ ke la aperoj⁶ devas ĉiuj esti elĵetataj sur la konton de la halucinoj. Nuntempe, konvenas esti iom malpli necedema. Kelkaj personoj konis la morton de parenco, de amiko, nur per komunikaĵo, je speco psika, kiu uzis, por esti transigita, nek la poŝtan servaron nek la telegrafan fadenon. La telepatiaj fenomenoj ĝuste observitaj estas sufiĉe multenombraj por ke oni plu ne povu ilin nei. Malproksima estaĵo povas troviĝi apud ni je la momento de sia morto kaj aperi al ni, kaj la apero povas esti vida de multaj ĉeestantoj.

Antaŭ kvardeko da jaroj, la turniĝantaj tabloj verŝigis ondegojn da inko. Iaj scienculoj, ceterre ŝatindaj, imagis ilin klarigi per nekonsciaj muskolaj movoj. Aliaj ĉiujn ilin juĝis artifiko de la ĉeestantoj. La atenta observado progresis. Movoj povas esti okazigitaj per tre malforta kontakto, kaj eĉ tute sen kontakto, de nevidebla forto, deveninta el homa estaĵo kaj kiu ŝajnas iom rilati al la elektro. Oni plu ne povas elĵeti la faktojn sur la konton de la erarego aŭ de la stultegeco.

Ne enirante la priskribon de la multegaj fenomenoj apartenantaj al la mondo de la nevideblaj psikaj fortoj, ni kontentiĝu aldoni ke la elmontroj de la animo nur komencas esti studataj per la eksperimenta metodo; kaj ankaŭ ni devas konstati ke, en tiu fako de faktoj ni povas preskaŭ neniam *eksperimenti*, sed nur *observi*, kio treege malgrandigas la kampon de la studoj. Kaj la kondiĉoj de la tera organeca vivo estas tiel malde likataj, ke ni estas proksimume en la situacio de homo kiu havus por fari astronomiajn observadojn en lando kies ĉielo estus preskaŭ senĉese nebula.

Tiuj kondiĉoj de escepto estas tiom pli bedaŭrindaj ke la

problemo de la animo, kiu estas la sama kiel tiu de la postvivo, estas, nekontraŭdireble, la plej interesa kaj la plej grava el la demandoj, ĉar la afero estas pri ni mem, pri nia intima naturo, pri nia senmorteco aŭ nia neniiĝo. Oni do devas aplaŭdi la penadojn de ĉiuj laborantoj kiuj, same kiel la estiminda aŭtorino de “La Postvivo”, S-ino Rufina Noeggerath, celas alporti novajn dokumentojn por lumigi

la misteron sub kiu nia transa destino restas envolvita...

Neniu povas malkonsenti ke la religioj ne estas, ĝis nun, plenumintaj niajn esperojn. Ĉu la psikaj studoj tion sukcesos? Mi diris iam, en parolado je la enterigo de Allan Kardec, ke spiritismo ne estas religio⁷, sed scienco. La estonto faros eble ke scienco kaj religio unuiĝos en unu solan sintezon. Ni studu, observu, serĉu. ■

Notoj

1. En la originalo “La Nekonato”.
2. Laŭ Vikipedio *Wilhelm Conrad Röntgen* (1895-1923).
3. En la originalo “evolucio”.
4. En la originalo “fotografo”.
5. En la originalo “Kio okazas ne povas [ne] okazi, ĉar ĝi estas determinita de kaŭzoj ekzistantaj. La homa volo, kiu ŝajnas al ni provizita je kelka libera elekto, estas unu el tiuj kaŭzoj; ĝi ankaŭ ne povas ne decidi sin pro la pli potenca motivo.”
6. Speco de manifestiĝo en kiu spirito fariĝas videbla (vidi *La Libron de la Mediumoj*).
7. “Ni povas rigardi Spiritismon (...) kiel ian triangulon de spiritaĵoj. La Scienco kaj la Filozofio ligas al la Tero tiun simolan figuron, sed la Religio estas ja la dia angulo, ĝin liganta al la ĉielo. En sia scienca kaj filozofia aspekto, la doktrino ĉiam estos ia nobla kampo de homaj esploroj, simile al aliaj kolektivaj movadoj kun intelekta naturo, celantaj la pliperfektiĝon de la Homaro. En ĝia religia aspekto tamen kuŝas ĝia dia grandeco, ĉar ĝi estas mem la restarigo de la Evangelio de Jesuo, definitive renovigante la homon por la grandeco de lia senmezura spirita estonteco.” (Emmanuel, el la libro *La Konsolanto*. 1a eld. Rio-de-Ĵaneiro: BSF, 1977, p. 19.)



Nova libro de
Legio de Bona Volo



**Elŝutu ĝin senpage
el Google-libroj!**



vizio de EURÍPEDES

Kortuŝa rakonto aŭtorita de la spirito Hilário Silva kaj mediume skribita de Chico Xavier. El la libro *A Vida Escreve* (Vivo Skribas), elektronika versio, BSF. Al Esperanto tradukis Jader Rodrigues.



Eurípedes Barsanulfo 33-jaraĝa
(1880-1918)

Eurípedes Barsanulfo, mediume eksterordinara homo, instruisto, politikisto, apotekisto kaj receptisto¹ forpasis kaŭze de la t.n. Hispana Gripo – pandemio, kiu falĉis la vivon de milionoj da homoj en la 10aj jaroj de la pasinta jarcento. Corina Novelino (1912-

1980) nevino kaj biografo de Eurípedes, rakontas² ke gvidantaj spiritoj antaŭdiris al li, ke la malsano certe plagos Sakramenton, lian loĝurbon. Medikamentoj estis anticipe mendataj, inkluzive de tinkturoj, sub la direkto de la spirito d-ro Bezerra de Menezes.

1. Temas pri mediumoj, kiuj pli facile servas kiel interpretantoj al la spiritoj por medicinaj preskriboj (vidi paragrafon 193 de *La Libro de la Mediumoj*).

2. Corina Novelino, *Eurípedes o Homem e a Missão*, 1a eld. Instituto de Difusão Espírita, 1979, p. 227.

Antaŭ la apero de la unua malsanulo, Eurípedes anoncas, ne la unuan fojon, pri sia baldaŭa forpaso. En oktobro 1918, kontaĝita vojaĝanto gastis en la urbo, kaj Barsanulfo estis alvokita por lin flegi. La gripo baldaŭ disiĝis tra Sakramento. Eurípedes kaj liaj kunlaborantoj

laboris pli intense ol iam ajn. En la 22a de la sama monato Barsanulfo ekfebris, sed ne ĉesis agadi. Li elkarniĝis efektive post kelkaj tagoj je la preciza tempo kaj dato anoncitaj de li, tio estas, je la 6a matene de la 1a de novembro 1918.

vizio de EURÍPEDES

En Sakramento, minasa³ urbo, Eurípedes Barsanulfo, la apostolo de l' mediumeco, ekperceptis sin eksterkorpe, en admirinda dumdorma liberiĝo de la animo, kaj iam, nokte, li vidis sin en mireginda ŝvebado. Kvankam netrankvila, kvazaŭ kuntrenita de ies volo, li suprenŝvebis plue kaj plue, meze inter nerezistebla kirliĝo de amo.

Li volis halti kaj malsuprenŝvebi, celante reposedi sian fizikan korpon. Tamen, lia entrepreno estis malsukcesa. Netuŝeblaj brakoj subtenis lian subliman ekskurson. Li estis en tute nova medio. Li sentis sin malpli peza kaj ene de oceano da aero eĉ malpli

peza... Kaj li forveturadis, kvazaŭ telekondukata birdo, ĝis li rekonis sin en senarba kaj verdoplena vasta kampo.

Admirante la belan pejzaĝon, li ekvidis viron, ne tiom for, meditantan kaj envolvitan per dolĉa lumo.

Kvazaŭ magnetizita de la nekonato, Eurípedes alproksimiĝis al Li...

Ĉe iu momento, tamen, tremante li ekhaltis.

En lia interno, io igis lin ne plu moviĝi...

Kaj plenigita de ĝojo, li vidis sin antaŭ Jesuo-Kristo.

Tute surprizita pro la neatendita honoro, Eurípedes klinis sian kapon kaj silentiĝis, sentan-

3. Urbo de la brazila ŝtato "Minas Gerais", Esperante *Minas-Ĵerajso*.

te sin kiel entrudulon, nekapanblan reveni aŭ antaŭeniri.

Barsanulfo ekmemoris la lecionojn de Kristanismo, la templojn de la mondo, la omaĝojn, en la literaturo kaj artoj, faritajn al la Sinjoro, kaj Lian mesaĝon, resonantan inter la homoj, en la daŭro de preskaŭ dudek jarcentoj...

Ravita de la grandiozece de la momento, li ekploris...

Dikaj larmoj banis al li la vivaĝon, kiam li prenis kuraĝon kaj levis siajn okulojn, humilsintene.

Tamen, li konstatis, ke ankaŭ Jesuo-Kristo ploris...

Pro Lia ploro, kaj invadita de subita sufero, Eurípedes volis ion fari, kio konsolus la Subliman Amikon... Eble karesi Liajn manojn aŭ, kvazaŭ lojala hundo, etendi sin antaŭ Liaj piedoj...

Sed Barsanulfo plumbiĝis sur la malfamiliara tereno...

Kaj li memoris la turmentojn de la Kristo, eterniĝantajn en la homoj, kiuj ĝis nun, sur la Tero, ŝetas sur Lin nekomprenon kaj sarkasmon...

Kaj tiel pensante, Eurípedes ne sin detenis.

Li malfermis la buŝon kaj petege demandis:

— Sinjoro, kial Vi ploras?

La alparolito ne respondis.

Kaj volante certiĝi pri tio, ke Jesuo-Kristo aŭdis lin, Eurípedes redemandis:

— Ĉu Vi ploras pro la malkredantoj de la mondo?

Ekstaze, la misiulo el Sakramento perceptis, ke Jesuo-Kristo lin reciproke rigardis. Kaj, post momento de atento, Li respondis per konsolanta voĉo:

— Ne, mia filo. Mi ne suferas pro la malkredantoj, al kiuj, cetero, ni ŝuldas amon. Mi ploras pro ĉiuj, kiuj konas l' Evangelion, sed ne praktikas ĝin...

Eurípedes ne kapablis prisribi tion, kio postsekvis.

Kvazaŭ falinta en profundan ombron, antaŭ la doloro, kiun alportis al li la respondo de la Kristo, li malsuprenŝvebis, malsuprenŝvebis...

Kaj vekiĝis en sia fizika korpo. Estis antaŭmatene...

Barsanulfo ellitiĝis kaj ne plu ekdormis.

Kaj de tiam, komunikinte al neniu pri la dia revelacio vibranta en lia konscio, Barsanulfo sin fordonis al la necesbezontoj kaj malsanuloj, neniam plu ĝuante ripozon kaj servante ĝis la morto. ■



Lernejo Allan Kardec, fondita de Eurípedes, en Sacramento (MG), Brazilo, en 1907.




Busto de Eurípedes Barsanulfo en korto de la lernejo.

La LIBRO DE LA SPIRITOJ

Pli ol **mil demandoj** pri la plej diversaj temoj koncernantaj “la senmortecon de la animo, la naturon de la spiritoj kaj ties rilatojn kun la homoj, la moralajn leĝojn, la nuntempan vivon, la estontan vivon kaj la estontecon de la homaro.”

Por iel bildigi la signifon de tiu verko, kiu estas je ĉies dispono jam de 165 jaroj, ankaŭ en Esperanto, ni publikigas rakonton de la spirito Hilário Silva, tradukitan de Joel do Ó el la libro *O Espírito de Verdade* (La Spirito de Vero). La titolo “Antaŭ Jarcento” kongruas kun la dato, kiam la libro eldoniĝis la unuan fojon. Nun ni jam povas diri “Antaŭ unu kaj duona jarcento”.



165 jaroj

Frontpaĝo de la 1a
franclingva eldono (1857)

Allan Kardec, la Sistemiginto de la Spiritisma Doktrino, en tiu malĝoja mateno de aprilo 1860, estis elĉerpita, korprenita.

Estis malvarme.

Malgraŭ la plifirmiĝo de la Spiritisma Societo de Parizo kaj la promesplena vendado de li-

broj, mankis mono por la giganta entrepreno, kiun la Superaj Spiritoj metis en liajn manojn.

Premoj intensiĝis...

Sarkasmaj leteroj amasiĝis surtable.

Kiam pli malkuraĝa li montriĝis, venis lia pacienca edzino, S-ino Rivail – la dolĉa Gaby –, kaj liveris al li certan pakaĵon, zorge faritan.

La instruisto malfermis ĝin, kaj trovis en ĝi simplan leteron, kiun li eklegis.

"S-ro Allan Kardec:

Respektan saluton.

Kune kun mia danko, mi sendas al vi aneksitan libron kaj ties historion, kaj petas, antaŭ ĉio, ke vi daŭrigu vian instrulaboron ĉe la homaro, ĉar favore al tio mi havas fortan kialon.

Mi estas bindisto ekde mia junaĝo, kaj laboras ĉe granda eldonejo en tiu ĉi ĉefurbo. Antaŭ ĉirkaŭ du jaroj, mi edziĝis kun fraŭlino, kiu laŭlonge de la jaroj montriĝis kiel mia ideala kunulino. Nia vivo glate fluadis, kaj ĉio estis ĝojo kaj espero, kiam, komence de tiu ĉi jaro, neatendite ŝi foriris el tiu ĉi vivo pro kaŝita malsano.

Mia malespero estis nepriskribebla, kaj mi konsideris min kondamnita al ekstrema forlasiteco.

Ĉar mi sentis la bezonojn proprajn al la ordinara homo surtera, kaj kunvivis kun la afliktaj dujoj de nia jarcento, tute sen fido al Dio, mi decidis sekvi la vojon trairitan de multaj homoj, kiam ili estas antaŭ fatalo...

La sufero esti apartigita de mia edzino venkis min, kaj, tiam, mi estis malpli ol homa ĉifonaĵo. Mi fariĝis malasidua laboristo, kaj mia estro, rekte kaj krude, minacis min per maldungo.

Miaj fortoj malaperis.

Mi plurfoje lasis min logi de Sejno, kaj finfine planis memmortigon.

'Tio estos facila, ĉar mi ne scias naĝi' – mi pensis.

Sinsekvaj noktoj de maldormo kaj tagoj de angoro pasis peze. En malfrua nokto malvarma, kiam problemoj kaj senkuraĝo pli forte regis min, mi iris la Ponton Marie. Mi ĉirkaŭrigardis, kaj vidis la riverfluan... Kaj, kiam mi apogis mian dekstran manon por ĵetiĝi en la riveron, mi ektuŝis malsekan objekton, kiu falis de sur la balustrado sur miajn piedojn.

Surprizite, mi vidis libron, kiun roso malsekigis. Intime, mi estis inter malbonhumora kaj scivola. Mi prenis la libron, kaj, sub malforta lumo de proksima fosto, mi legis sur la frontpaĝo:

‘Tiu ĉi verko savis min. Legu ĝin atente, kaj profitu bone la okazon. - A. Laurent.’

Perpleksa mi legis la verkon ‘La Libro de la Spiritoj’, al kiu mi aldonis malgrandan mesaĝon. Tiun ekzempleron mi

transdonas en viajn sindonajn manojn, kaj vin rajtigas disponi pri ĝi laŭ via volo.”

Krom tio, troviĝis sur la mesaĝo dankaj vortoj, subskribo, dato kaj adreso de la sendinto.



Ponto *Marie*, Parizo, Francio.

Tiam, la Sistemiginto malpakis ekzempleron de *La Libro de la Spiritoj*, riĉe binditan, sur kies kovrilo li vidis la komencliterojn de sia pseŭdonimo, kaj sur la iom makulita frontpaĝo li legis kun emocio ne nur la noton, pri kiu informis la letersendinto, sed ankaŭ alian, skribitan per firmaj literoj:

“Ĝi savis ankaŭ min. Dio benu la animojn, kiuj kunlaboris por ĝia eldono. *Joseph Perrier.*”

Post legado de tiu providenca letero, la Edukisto Rivail spertis novan lumon, kiu banis lin interne...

Preminte la libron kontraŭ la brusto, li ne plu rezonis laŭ sentoj

de senkuraĝeco aŭ sufero, sed jam kongrue kun radianta espero.

Estis necese labori plu, pardonni la ofendojn, akcepti la sinoferon kaj malatenti la ŝtonĵetojn...

Antaŭ lia spirito ŝtormis la mondo bezonanta renoviĝon kaj konsolon.

Allan Kardec leviĝis de sia malnova fotelo, malfermis la fenestron

antaŭ li, kaj rigardis la publikan straton, kie piediris laboristoj kaj virinoj, infanoj kaj maljunuloj...

La rimarkinda laborulo de la Granda Revelacio profunde kaj longe spiris, kaj, antaŭ ol reprezni la plumon por la ĉiutaga laboro, li levis tukon al la okuloj kaj viŝis al si larmon... ■

El la libro *O Espírito da Verdade*, aŭtorita de pluraj spiritoj, mediume skribita de Chico Xavier kaj Waldo Vieira. 10a eld. Rio-de-Ĵaneiro: BSF, 1997.



Dum la 2a BRES, okazinta en Uberlândia-MG, en 2007, la rakonto estas teatrece prezentita de tri amatoraj aktoroj. Sur la foto videblas la sceno, en kiu Allan Kardec ricevas de sia edzino la pakaĵon senditan de la junulo J. Perrier. Aktoras tiuscene Laís Cruz kaj Raphael Araújo.

Evangeliaj plukoj

“Starigu rekte sur viaj piedoj.”

Paŭlo (*La Agoj*, 14:10)

AL ĈIU

Dum nia enkarniĝo, en la materia mondo, ni ĝenerale nur vidas tiujn, kiuj havas kriplaĵojn, perdis la korpan ekvilibron, pene sin trenas sur la grundo, eltenas dornajn difektojn. Ne sufiĉa estas nia vidado por distingi tiujn malsanajn je la spirito, lamajn je la penso, pereintajn je la koro.

Kie nur ekzistus blinduloj, tie oni perdus la intereson kaj la memoron pri la vidaparato; pro la sama kialo, sur la krusto de la Tero, kie frakase grandega plimulto konsistas el animoj paralizitaj koncerne la virton, tre malmultaj homoj rekonas la malharmonian staton de sia propra spirita sano, konsciante siajn nekontestebajn bezonojn.

El tio oni do konkludas, ke la misio de la Evangelio estas mul-

te pli bela kaj vasta ol kiel ni povas imagi. Jesuo daŭre verŝas ĉiutage siajn benojn. Kaj la mirindaĵoj kaŝe faritaj en la silento de lia senfina amo estas pli grandaj ol tiuj, okazintaj en Jerusalemo kaj Galileo, ĉar, laŭ la apostolaj raportoj, la resanigitaj blinduloj kaj lepruloj poste denove malsaniĝis kaj mortis. La resaniĝo de niaj Spiritoj malsanaj kaj paralizitaj estas pli grava, ĉar ĝi fariĝas celante la eternecon.

Nepre necesas, ke ni ne deflankiĝu en iluziajn konkludojn. Ni akriĝu al ni la orelojn, fidante la parolon de la Apostolo al la Nacionoj. Estas al ni nepra devo unuope leviĝi proprapiede, ĉar multaj atendas anĝelajn flugilojn, kiuj ne apartenas al ili. ■

Fonto: XAVIER, Francisco C. | Libro *Caminho, Verdade e Vida*
Spirita aŭtoro “Emmanuel” | Plukita el *Reformador*, aprilo 2021.

**Ĉeesta
Evento**

Reiri al la menuo

Ĉu transtomba **BABELO?** Kiel komunikas la spiritoj?

13a Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj
22 – 23 de aprilo 2023 | Uberlândia-MG

Aliĝoj ekde oktobro 2022 ĉe baes.org.br

BAES

Brazila Asocio de Esperantistaj Spiritistoj

www.baes.org.br
kontakto@baes.org.br
+55 34 997748785